

Redaktoro:

Jozefo Németh

Vicredaktoro:

Katalin Kováts

Kunlaborantoj:

Boo Mee Kim-Lindblom †

Stefan MacGill

Rob Moerbeek

Atilio Orellana Rojas

Radojica Petrović



ilei

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistai Instruistoi

Katalin Kováts gvidas ekzercon pri la vortkomenca "ho" por
francaj kursanoj en Kvinnetalo, 2003 aprilo

ENHAVO

Humphrey TONKIN: <i>La scienca kunteksto de E-instruado</i>	1
Ronald J. GLOSSOP: <i>La historio de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo</i>	7
<i>Al pli viva ILEI</i>	11
<i>Inter vi, mi, kaj niaj kulturoj</i> (Interkulturo 2 lanĉita)	12
<i>IK-Trejnseminario 2003</i> (impresoj de partoprenantoj)	13
<i>Varbendas, do varbiloj. Ni bezonas unu la alian (smg)</i>	15
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (BR, GB, FI, FR, DE, JP, SE)	21
<i>Por via notlibro</i>	30
<i>Kiu korespondas pri medaloj sur oficiroj?</i> (recenzo de Stefan MACGILL)	31
<i>Konferenco 2004 – informoj, aliĝilo</i>	32

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, YU-32000 Ĉaĉak, Serbio. Tel. (+381) 32 371053. Fakso: (+381 32) 342 101 <radp@ptt.yu> *Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto Interkulturo*

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Pannonia u. 30. I/6, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@galamb.net> *Eldonado (inkl. periodaĵojn), Int. Infana Kongreseto (komisie de UEA)*

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel.: (+31 70) 3556677, <iei001@tiscali.nl>. *Konferencoj*

Vicsekretario: *vakas*

Estrarano pri financoj: Boo Mee Kim-Lindblom (✉), Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

Estrarano: Hokan Lundberg, c/o stan Pivalica, Tadeuša Koščuška 80/18, YU-11000 Beograd, Serbio. Tel. (381 11) 188 496, <hokan@ikso.net> *Retprojektoj, junulara agado, informado*

Estrarano: Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel.: (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673. <mauro.latorre@uniroma3.it>; <http://host.uniroma3.it/docenti/latorre/> *Universitata kaj scienca agadoj*

Estrarano: Aleksandr Blinov, Pr. I. Jakovleva 10A-63, RU-428027 Ĉeboksari, Rusio. Tel.: (7 8352) 665 908, <delfeno@chtt.ru> *Lerneja agado, instrukapabligo, ekzamenoj*

Humphrey Tonkin:

La scienca kunteksto de E-instruado

(Prelego en la Konferenco de ILEI, Örestrand, Svedio, 4 aŭgusto 2003)

En la Simpozio de la *Akademio de Esperanto* pri la E-kulturo, kiu ĵus okazis en Gotenburgo, mi prelegis pri la origino de la E-kulturo. Mi komencis miajn rimarkojn per cito el la *Unua Libro*, kiun Zamenhof aperigis en 1887. En la *Antaŭparolo* de la *Unua Libro* Zamenhof prezentis kiel 'la plej ĉefajn problemojn, kiujn estis necese solvi' en la kreo de lia internacia lingvo tri aferojn:

I. Ke la lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante.

II. Ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la kompreniĝado kun homoj de diversaj nacioj, tute egale ĉu tiu ĉi lingvo estos akceptita de la mondo kaj trovos multe da adeptoj aŭ ne, – t.e. ke la lingvo jam de la komenco mem kaj dank' al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikigoj.

III. Trovi rimedojn por venki la indiferecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivan – ne kun ŝlosilo en la manoj kaj en okazo de ekstrema bezono.

Plej atentokapta pri la unua el tiuj tri problemoj estas la nocio, ke oni devu povi lerni E-on 'ludante'. Esperanto ne estas, laŭ la implicita aserto de Zamenhof, kiel aliaj lingvoj, kiuj postulas longan kaj komplikan laboron antaŭ ol la lernanto eĉ atingas la sojlon de utiligeblo de la lingvo: jam de la komenco oni devas povi ĝin uzi, verŝajne per senpera formado de strukturoj en la lingvo kaj per rilatado kun aliaj partneroj en la ludo.

Multaj projektantoj de lingvoj malmulte konsideras tiujn, kiuj devas lerni iliajn lingvojn, kaj koncentras siajn fortojn je simpleco kaj logikeco: de la komenco, Zamenhof estis tre konscia pri tio, ke lingvo estas komuna

fenomeno, kaj homa fenomeno – do ke necesas krei komunumon de lernantoj.

Kaj ne nur lernantoj. La dua problemo, ke oni povu manipuli la strukturojn de la lingvo tiel 'ke la lingvo jam de la komenco mem kaj danke al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikiĝoj', rilatas al la praktikado de la lingvoscio. Ne sufiĉas lerni la ludon, sed poste oni devas povi perfektigi sin.

La tria 'problemo' rilatas senpere al la demando pri konstruo de komunumo: Zamenhof rekonas la fakton, ke sen parolantaro la lingvo ne povas 'vivi'. Kaj, li aldonas, „El ĉiuj projektoj, kiuj en diversaj tempoj estis proponitaj al la mondo ... neniuj solvis pli ol unu el la diritaj problemoj, kaj eĉ tiun ĉi nur parte.” Alivorte dirite, la lingvo-projektantoj fokusiĝis pli-malpli ekskluzive je la lingvaj aspektoj de siaj projektoj kaj neglektis la sociajn aspektojn.

Apenaŭ necesas diri, ke en la *Unua Libro* ni jam havas kvazaŭ manifeston de la E-instruado: lerni la lingvon devas esti luda, ĝi devas celi perfektigon, ĝi devas krei komunumon. La plej granda avantaĝo de E-o, super ĉiuj aliaj klasĉambraj kaj lernilaj lingvoj, estas la fakto, ke ĝi estas tuj (aŭ preskaŭ tuj) praktike utiligebla – aŭ almenaŭ tion oni facile asertas. Ĝis kiu grado ni povas pruvi tiun fakton, kaj ĉu indus pli emfaze ĝin pruvi al niaj fakuloj-kolegoj?

Kompreneble, utiligi lingvon signifas ankaŭ trovi rimedojn por ĝin utiligi. En tiu rilato la Interreto faris tutan revolucion. Hodiaŭ estas eble aŭskulti parolatan E-on, en kiu ajn loko je kiu ajn horo: perreta radio igis tion realo. Ne estas malfacile ankaŭ krei la proprajn parolatajn tekstojn kaj mesaĝojn, aŭ helpi siajn lernantojn tion fari. Kompreneble, ne ĉiu instruisto havas facilan aliron al la reto, sed de monato al monato la situacio plifaciliĝas, kaj pli kaj pli da homoj estas rete ligataj.

Kompaktaj diskoj ankaŭ kontribuas al tiu ĉi revolucio. Muzikaj diskoj en E-o fariĝas pli kaj pli abundaj, kaj nun UEA komencas savi la iamajn sonbendojn de la iama Magnetofona Servo de UEA per surdiskigo kaj vendado. Kvankam plejparte tiu ĉi materialo ne taŭgas por komencantoj, ĝi estas facile utiligebla en pli postaj stadioj.

Zamenhof, en sia prezento de la tri 'problemoj', kiujn li devis venki, emfazas la perfektigon en sia dua 'problemo'. Kiel krei kondiĉojn, en kiuj homoj povu plene ellerni kaj plene eluzi la lingvon? Ni bezonas sur tiu ĉi tereno la apartan helpon de la instruistoj. Kvankam ĉiu homo scias, ke li aŭ ŝi bezonas lernilojn en la unua stadio de lernado de E-o, tion oni ne tiel klare komprenas je la dua stadio. Multaj esperantistoj en niaj rondoj atingas certan nivelon de lingvokapablo kaj malsukcesas transiri ĝin. Kiam oni povas adekvate elturniĝi en normalaj konversaciaj cirkonstancoj, verki pli-malpli seneraran tekston, kaj plenumi siajn diversajn bezonojn, oni atingas ian lingvan ebeniĝon, tra kiu estas tre malfacile trabori. Tiu ĉi estas ofta fenomeno en ĉiuj lingvoj: enmigrintoj, kiuj neniam fariĝas bonaj uzantoj de sia nova lingvo, sed kiuj kapablas tute bone perlabori sian panon, trakti kun instancoj, eduki sian familion; lingvaj studentoj studentaj en aliaj landoj, kiuj laŭ siaj profesoroj subite ĉesas lerni la celatan lingvon ĉar mankas sufiĉa pozitiva motivigo por tion fari.

La manko de bona lingvoscio ĉe multaj esperantistoj estas inter la plej grandaj problemoj de la E-movado, kiel Zamenhof klarvide anticipis jam en 1887. Se homo ne sentas sin ĉeĥejme en Esperanto, tiu homo nur pene legas Esperantajn literaturaĵojn aŭ sciencajn studojn aŭ informan materialon, tiu homo malfacile orientiĝas en prelegoj, malfacile trovas sian lokon por bone kontribui al la organiza agado de la E-movado. Sciencistoj asertas, ke eĉ la plej kleraj homoj uzas nur parton de siaj cerboj: en la E-movado ni uzas nur malgrandan parton de la kolektiva cerbo de niaj membroj pro la malalta komprennivelo de tiuj personoj. Lingva kapablo estas unu el la ŝlosiloj al organiza kapablo ĉe ni – kaj inverse (estas multaj homoj en niaj rondoj, kiuj fariĝas prezidantoj ĉar ili bone parolas la lingvon, ne ĉar ili kapablas prezidi).

Tradicie, ni emis ne doni multan atenton al lernado de E-o en niaj Universalaj Kongresoj kaj aliaj internaciaj konferencoj. Oni tro ofte emfazas, ke ili estas manifestacioj de la E-movado: ni ne malkaŝu al la publiko, ke niaj homoj eventuale ne plene kapablas la lingvon, al kiu ili estas tiel publike ligitaj. Mi opinias, kaj ĉiam opiniis, ke tiu estas eraro. Mi ŝatus vidi multe pli da atento al lingvolernado kaj lingvoperfektigo en niaj kongresoj. Mi scias, ke unu el la celoj ekzemple de la Internacia Kongresa Universitato estas prezenti modelojn de la bona lingvouzo kaj

doni okazon al la homoj aŭskulti modelan E-on – sed tio ne sufiĉas. En mia ideala mondo, aŭ mia ideala movado, la bonaj uzantoj de E-o estus publike rekonataj kiel tiaj: ili fariĝus internaciaj trezoroj same kiel la ĉinoj nomas certajn siajn eminentulojn naciaj trezoroj. Kaj la instruistoj havas apartan respondecon krei la procedojn, la kondiĉojn, en kiuj tia perfektigo povu okazi. Ni memoru kion implicis tiuj 'problemoj' de Zamenhof: la lernado kaj uzado de E-o estas nur parte lingva. Ĝi estas ankaŭ, kaj emfaze, homa.

Kompreneble, krei kondiĉojn, en kiuj lernado povu okazi, estas ne nur pedagogia demando, sed ankaŭ organiza. En la lastaj jaroj ni iom forgesis la gravecon de la E-kulturo: ni ne donas al ĝi adekvatan atenton en nia gazetaro, nek en niaj kongresoj. Ni ne reliefigas kaj elstarigas niajn plej grandajn verkistojn, nek interpretas kaj prezentas iliajn verkojn al la publiko. Mi ofte en pasinteco skribis pri la graveco de bona libro-kulturo en E-o. La homoj ne sufiĉe aĉetas librojn, la aĉetantoj ne sufiĉe legas, kaj la legantoj ne sufiĉe parolas inter si pri la fruktoj de tiu legado. El komuna literaturo kaj komuna kulturo venas pli forta sento de solidareco kaj de komunaj valoroj.

En la Universala Kongreso ĉi-jare ni donis pli da atento al klerigo pri E-o, prezentante diversajn aspektojn kaj problemojn de la E-movado. Ni ankaŭ emfazis, pere de tiuj programeroj kaj ankaŭ per la Belartaj Konkursoj, aŭtoraj duonhoroj ktp., la E-literaturon. Mi ŝatus en venontaj jaroj aranĝi, ke ĉiujare oni elektu unu libron kaj instigu la kongresanojn legi ĝin kaj veni al la kongresurbo pretaj pridiskuti ĝin. Ne nepre devus temi pri nova libro, sed ankaŭ pri klasikaĵoj de nia literaturo. En la Universala Kongreso oni povus antaŭvidi kelkajn podiajn diskutojn pri la verko, prelegojn, ktp.

Mi opinias, ke ĉio ĉi, kaj same demandoj pri ekzemple teatro en E-o, estas plej bone traktataj per sistema kaj konsekvenca plano, kaj tial mi klopodis krei tian planon per prezento de listo de kulturaj prioritatoj en la Komitato de UEA antaŭ unu jaro.

Kompreneble, kiel ILEI jam klare rekonas, ankaŭ necesas pretigi pli kompetentajn instruistojn. Ĉar E-o estas relative facila lingvo, kaj ĉar ĝi ne havas firman lokon en la lerneja studprogramo, granda proporcio de la instruado de E-o estas farata de amatoroj, kiuj ofte ne konas la plej

bonajn instrumentadojn nek scias kiel efike organizi la kursojn. Kaj eĉ inter la profesiaj instruistoj estas relative malmultaj homoj, kiuj estas profesie kvalifikitaj kaj de la kolegoj alte respektataj lingvoinstruistoj. La problemoj havas tri partojn:

1. gravas elstarigi la vere kompetentajn instruistojn kaj bone utiligi ilin;
2. necesas altigi la kompetenton kaj scion (ankaŭ lingvoscion) de la profesiaj instruistoj;
3. gravas ne malatenti la amatorajn instruistojn.

Se temas pri ĉi-lastaj, ni bezonas pli da atento al la metodiko de neformala instruado de la lingvo, kaj al la bazaj scioj, kiujn profesiuloj havas, sed amatoroj ofte ne.

Kaj ĉar instruado estas ĉiam negocita procedo inter instruisto kaj lernanto, ni estu adekvate sentemaj pri kulturaj diferencoj en la edukaj sistemoj de la diversaj landoj. Kio funkcias en ĉina klasĉambro eble ne funkcias en, ni diru, brita – kaj inverse.

Krome, se ni vere volas apliki la lingvon en realaj situacioj, se ni volas komunikiĝi kun homoj en aliaj landoj, se ni volas instigi niajn studentojn kvazaŭ plonĝi en tiun pli grandan mondon, kiun E-o (unike inter la lingvoj, ĉar tutmonda) kapablas malfermi, ni devas mem bone koni tiun mondon. Ne sufiĉas scii pri gramatiko kaj vortprovizo: la bona E-instruisto bone konas internaciajn aferojn, bone konas la diversajn kulturojn, scias kiel gvidi la studentojn inter tiuj kulturoj. Vi legu nacilingvaj revuojn kaj ĵurnalojn, kaj ankaŭ la materialon haveblan en E-o, ekzemple pere de la paĝoj de la escepte bona revuo *Monato*.

Inter la ĉefaj prioritatoj de ESF, *Esperantic Studies Foundation*, en Nordameriko, estas mobilizi la E-instruistojn por kunlaborigi ilin kaj perfektigi ilian scion. Ni planas organizi en la venonta julio specialan trisemajnan programon por E-instruistoj. Ĝi okazos ĉe SIT, *School for International Training*, la malgranda universitata institucio kie okazas la *Nordamerikaj Someraj Kursoj*, aŭ NASK, kiuj jam tridek jarojn okazas en Usono. Ni verŝajne ankaŭ havos niajn kutimajn kursojn por homoj kun nur tre elementa scio de la lingvo, homoj kun meznivela scio, kaj homoj kun pli progresinta scio.

Tiu kursaro estas finance subvenciata de ESF mem. Mi estas estrarano de ESF, kune kun kvin de aliaj homoj el Usono kaj Kanado. ESF ekzistas por antaŭenigi la objektivan scian studon de la fenomeno Esperanto kaj la cirkonstancoj, kiuj ĉirkaŭas ĝin. Ni interesiĝas pri studado de lingvaj problemoj, de la metodiko de E-instruado, de manieroj transponti lingvajn diferencojn, kaj similaj aferoj. Kvankam nia ĉefa fokuso estas nordamerika, ni akceptas esplorproponojn el ĉiuj mondopartoj kaj subtenas plurajn el ili. Ni ankaŭ subvencias diversajn retajn kursojn kaj paĝarojn, kiel ekzemple *Edukado.net* kaj *Lernu.net*. Ni nuntempe apogas projekton por krei grandan tekstan korpuson de E-o, utilegan al lingvistoj, kiuj volas studi kiel en la praktiko E-o estas lingve uzata. Ni serĉas ĉiam altkvalitajn projektojn kaj altkvalitajn esploristojn, kaj ni estas tre insistaj pri la objectiveco de nia aliro al E-o: ni ne estas unuavice disvastiga organizaĵo (kvankam ni ja funkciigas la Nordamerikajn Kursojn), sed scienca organizaĵo. Ni kredas, ke necesas, ke E-o kaj la esperantistoj povu defendi siajn pretendojn per objektivaj kaj science agnoskataj donitaĵoj.

Kiel estrarano de UEA ankaŭ pri esploro kaj dokumentado, kaj Direktoro de la *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj* (CED), mi aparte interesiĝas pri la scienca prezento de E-o. Inter la ĉefaj agadoj de CED estas aperigo de faka revuo, *Language Problems and Language Planning*, kiu aperas trifoje jare. La revuo estas inter la plej prestiĝaj socilingvistikaj periodaĵoj, kun forta redakta komitato, kiu konsistas el homoj kiel ekzemple *Joshua Fishman*, *Enrique Hamel*, *David Graddol*, kaj *Ulrich Ammon*. Ni aperigas en la revuo ĉiuspecajn artikolojn, kiuj rilatas al aspektoj de la lingvoplanado kaj lingvopolitiko, sed ni ankaŭ aparte emfazas interlingvistikajn temojn, kaj ofte aperas artikoloj, kiuj iel rilatas al E-o. La plejparto de la artikoloj estas en la angla lingvo, sed ni ankaŭ aperigas artikolojn en aliaj lingvoj, ekzemple la hispana, franca, germana, kaj eĉ lastatempe la pola. De ĉiu artikolo aperas resumo en E-o kaj en iu tria lingvo. Mi forte rekomendas tiun ĉi revuon al vi kaj instigas vin aboni ĝin, legi ĝin kaj eĉ kontribui artikolojn al ĝi.

CED ankaŭ okupiĝas pri plej diversaj aliaj aferoj – la aperigo de la bulteno *Informilo por Interlingvistoj*, la ĉiujara okazigo de *Esperantologia Konferenco* en la kadro de la Universala Kongreso, la aperigo de

informaj dokumentoj diverslingvaj pri E-o kaj ankaŭ de tempo al tempo libroj (en preparo nunmomente, ekzemple, estas traduko de la lastatempa libro de la lingvisto *Robert Phillipson* pri eŭropa lingvopolitiko).

Estas tre grave, ke ĉiu serioza esperantisto subtenu la seriozan, scian aliron al E-o kiel lingva kaj socia fenomeno. Ni kalkulas je via subteno en tiu agado – per legado, abonado, utiligo de la sciencaj studoj – kaj konstantaj klopodoj perfektigi kiel instruistoj de E-o kaj kiel modelaj uzantoj de la lingvo.

D-ro Ronald J. Glossop:

La historio de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo

(Prelego en la 36-a ILEI-konferenco, Örestrand, Svedio, 5 aŭgusto 2003)

La historio de la organizaĵo "*Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*" plejparte estas la historio de la laboro de *Charlotte Kohrs*, kiu loĝis en San-Diego, Kalifornio, Usono dum la lasta parto de sia vivo. Charlotte estis instruisto de infanoj, aparte de tiuj kiuj havis problemojn rilate al legado. Dum sia laboro ŝi ofte uzis pup-teatraĵojn kaj eĉ kreis specialan bild-vortan lingvon por helpi ilin lerni legi. Post la morto de sia edzo en 1982, Charlotte, tiam 72-jaraĝa, interesiĝis pri E-o. Pensu pri tio: ŝi eklernis E-on kiam ŝi jam havis 72 jarojn! Efektive, ŝia revo instrui E-on al infanoj ĉirkaŭ la mondo donis al ŝi novan vivon dum dudek jaroj. Charlotte, Honora Membro de ILEI, mortis je la 31-a de julio 2002 en sia domo.

Charlotte Kohrs studis por lerni E-on dum kelkaj jaroj kun la E-klubo de San-Diego, Kalifornio. En 1985-1986 ŝi kunlaboris kun *Dorothy Kruger* por eldoni lernolibreton por komencantoj kun la titolo "*Dek Fabeloj: Lernolibro por Grupa Legado aŭ Hejma Studado*." Kvankam tiuj fabeloj estas ĉefe por infanoj, tiu libro efektive estas por ĉiuj komencantoj. Oni reeldonis ĝin en 1996, kaj angla-parolantaj komencantoj ankoraŭ uzas ĝin.

En Majo 1987 Charlotte kaj kelkaj amikinoj en Kalifornio fondis la organizaĵon "*Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*" por pligrandigi la grupon de tiuj kiuj antaŭenigas la lingvon E-on. Ili decidis ke ĉi tiu organizaĵo havos tri

pli specifan celojn: (1) enkonduki E-on al infanoj en Usono kaj aliaj landoj, (2) iĝi ponto inter infanoj kiuj lernas E-on en diversaj landoj, kaj (3) krei kaj distribui senpage aŭ malmultekoste materialojn al instruistoj de E-o kaj samtempe instigi la interŝanĝon de bildkartoj kaj similaj materialoj inter lernantoj en diversaj landoj. Dum la jaroj Charlotte ricevis helpon de *James Faughnan*, *David Jordan*, *Janice* kaj *John Atkinson*, *Kent Jones*, *Kim Keeble*, kaj aliuloj kiuj donacis monon.

En 1987 Charlotte ankaŭ eldonis sian unuan lernolibron por infanoj, "*Let's Talk Around the World [Ni Parolu Ĉirkaŭ la Mondo]*." Ĝi havas ok lecionojn kun dialogoj en E-o kaj tradukoj en la anglan por ne-esperantistaj instruistoj en elementaj lernejoj. Tiun saman jaron ŝi ankaŭ komencis novan projekton, "*La Revuo de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*," kiu havas ne nur dialogojn (en E-o kaj la angla) sed ankaŭ bildojn, notojn, kaj enigmojn desegnitajn de infanoj mem en diversaj urboj kaj landoj tra la mondo. Ŝi distribuis tiun revuon al instruistoj de E-o en multaj lokoj, kaj ŝi eldonis materialojn, ĉefe desegnaĵojn, kiujn ili sendis al ŝi. La lasta numero de la revuo aperis en 1991 ĉar ŝi ne havis sufiĉe da tempo por eldoni kaj distribui ĝin, kaj ŝi opiniis ke aliaj taskoj estas pli gravaj.

La plej aktivaj jaroj por Charlotte estis 1987-1996. Dum tiu periodo ŝi laboris kun instruistoj en elementaj lernejoj en San-Diego. Kutime tiuj klasoj studis E-on dum unu horo semajne. Charlotte produktis tri vidbendojn en kiuj la lernantoj mem instruis E-on al aliaj infanoj, la lastan en 1991. Ŝi komponis ankaŭ tre belajn kaj utilajn instru-kantojn, kaj poste ŝi eldonis libreton kaj sonbendon de ili kun la titolo "*Kantu Esperante kun Janico kaj Johano: 12 Konversaciaj Kantoj por Komencantoj*." Stipendio de la *Eduka Fondaĵo "Carson"* en Kalgari, Kanado tre helpis ne nur produkti la sonbendojn sed ankaŭ sendi ilin al pli ol 375 klasoj tra la mondo. Charlotte eldonis ankaŭ du "bildlibretojn" kiuj entenis kelkajn grandajn desegnaĵojn de infanoj: (1) "*Bonvenon, Amiko, Ĉu Vi Parolas Esperanton?*" kaj (2) "*Bonvenon kaj Saluton! Parolu Esperanton Kun Ni*." En 1991 ŝi eldonis ankaŭ "*Ni Esploru la Mondon!*", novan specon de libreto por infanoj en kiu lernantoj kaj instruistoj en diversaj landoj desegnis bildojn kaj verkis paĝojn kun demandoj kaj respondoj pri siaj propraj landoj.

Charlotte daŭre verkis ankaŭ siajn proprajn lernolibretojn. La unua versio de "*La Bela Planedo*" aperis en 1992 kaj la dua reviziita versio poste en la sama jaro. Ĉi tiu bonega libro kun desegnaĵoj de infanoj ne nur instruas la lernantojn pri geografio kaj naturo sed ankaŭ instigas bonan sintenon al la mondo kaj la prizorgado de ĝi. En 1993 ŝi eldonis pli tipan lernolibron "*Dek Demandoj: Lernolibro por infanoj 7 ĝis 14-jaraj*." Ĉiu leciono estas kombino de demandoj kaj respondoj, kaj en la tuta libro oni lernas la diversajn demandvortojn de E-o. Ĉi tiu lernolibro estas por angle-parolantaj instruistoj kaj lernantoj.

En 1994 Charlotte decidis, ke la infanoj bezonas eĉ pli simplajn legaĵojn. Tial ŝi verkis libreton "*ABC en Esperanto*" en kiu estas unu aŭ du vortoj por ĉiu litero de la alfabeto. Ĝi enhavis kolorigendajn desegnaĵojn faritajn de *James Faughnan*, kiu multe helpis Charlotte dum ŝiaj lastaj jaroj. Tre lerte ŝi uzas tiun libreton por instrui ne nur pri la alfabeto sed samtempe pri diversaj gramatikaj punktoj. La lasta libreto kiun Charlotte verkis por infanoj estas "*Flugu kun Petro*," kiu aperis en 1995. La temo estas ke Petro povas flugi tra la tuta mondo en sia magia vagono, Esperanto. Kiel kutime en ĝi estas multaj desegnaĵoj faritaj de *James Faughnan*. Charlotte produktis ankaŭ sonbendon por ĉi tiu libro. Ĝi estas por angla-parolantaj instruistoj kaj instruantoj de junaj infanoj.



Charlotte kreis tri diversajn projektojn por infanoj, kiuj lernas E-on. La unua estis "*Mondo Rondo*," kiu komenciĝis en 1991. Grupoj, kutime klasoj, kiuj volis interŝanĝi bildkartojn, kontaktis Charlotte, kaj ŝi poste sendis al ili liston de la nomoj kaj adresoj de la gvidantoj de la aliaj grupoj, kiuj indikis intereson en la projekto. La dua projekto, kiu komenciĝis en 1994, estis "*La Monda Stelaro*," projekto por individuaj infanoj. Por fariĝi "*Stelo*" lernanto devas lerni 200 vortojn kaj lerni demandi dek bazajn demandojn. Krome tiu lernanto promesis korespondi Esperante kaj ankaŭ instrui E-on al alia persono dum almenaŭ 15 minutoj semajne. Ĉiu stelo ricevis atestilon de Charlotte. La tria projekto, kiu komenciĝis en 1996, estis "*Ago-Tago por Infanoj*." Dum la dua aŭ tria semajno de la monato februaro por festi la "*Semajnon de Internacia Amikeco*" ĉiu lernanto devus kanti (kun aliuloj se eblas) la kanton "*Sur la Tero*," kiu uzas la francan melodion "*Frato Jako*." Charlotte mem aŭtoris tiun kanton aparte por "*Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*".

En la jaro 1999 Charlotte opiniis, ke ŝi ne plu povis estri "*Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*." Ŝi tre volis fari tiun taskon, sed ŝia sano ne plu permesis tiom da laboro. Sekve ŝi petis *Darlene Evans* estri la organizaĵon. Darlene, kiu loĝas en Indianola, Iowa en la mezparto de Usono, akceptis la taskon, sed bedaŭrinde ŝi tre baldaŭ devis rezigni pro neanticipitaj gravaj sanproblemoj. En la jaro 2001 mi akceptis la taskon esti la nova Direktoro de "*Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*." Mi ne povos krei libretojn kaj kantojn kaj revuetojn por infanoj kiel faris Charlotte. Mi opinias, ke mia ĉefa tasko estas informi ĉiujn pri la bonaj materialoj kiujn Charlotte kreis kaj daŭrigi la projektojn, kiujn ŝi komencis. Nun oni devas uzi la reton por fari tion, sed oni ankoraŭ devos uzi ordinaran poŝton por kelkaj instruistoj, kiuj ne havas ŝancon uzi komputilon. Mi ricevis bonan helpon de *Bill Mania* en Ĉikago, kiu kreis retejon por *ICLM*. Per la bona laboro de *Katalin Kováts* en Nederlando oni povas informiĝi pri la diversaj materialoj kreitaj de Charlotte ĉe la *KATALOGO* de la retejo www.ikso.net. Kompreneble mi devos produkti novajn ekzemplerojn de la libroj kaj sonbendoj kiam ni eluzas tiujn, kiujn mi nun havas. Samtempe Charlotte rajtigis la organizaĵon "*Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*" kaj min meti ĉiujn siajn verkojn en retejojn, por ke ili estu haveblaj senpage al instruistoj kaj lernantoj ĉie en la mondo. Fari tion kaj krome provizi materialon al la revuo *Juna amiko* rilate al "*Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*" estos miaj ĉefaj taskoj dum la venontaj jaroj.

Mi finu per mallonga poemo, kiun mi iam verkis pri Charlotte kaj ŝia revo.

*Iun tagon, aŭ eble iun nokton
 (Kiu scias precize kiam?)
 La laŭtaj, militantaj voĉoj de la gravaj grandaj homoj
 De la gravaj grandaj landoj
 Paŭzos dum momento de sia konfuzanta bruo.
 La Tero silentiĝos,
 Kaj tra la tuta mondo oni povos ekaŭdi
 La malgrandajn, mildajn voĉojn de la infanoj ĉie
 Kiel ili kantas kune per unu lingvo:
 "Sur la Tero, bela Tero, Loĝas ni, kantas ni,
 Kune sur la Tero, Monda familio, Famili', famili'."*

Al pli viva ILEI

Organiza refortiĝo, unu el la tri agadprioritatoj aprobitaj de la Komitato en la lasta kunsido, fariĝis akso kaj ĉefslogano en laboro de la nova Estraro de ILEI dum la trimonata periodo post la elekto. Dum aŭgusto kaj septembro la Estraro ret-kunsidis praktike senĉese – ni interŝanĝis ĉiutage mesaĝojn pri farendajoj kaj farataĵoj, kaj laŭbezzone voĉdonis pri urĝaj decidoj. En la semajnoj 22-28/09/2003 kaj 20-26/10/2003 ni havis formalajn retkunsidojn, kun pli intensa interŝanĝo de retmesaĝoj pri difinita tagordo adaptita al aktualaj bezonoj kaj plejurĝaĵoj. Tiu nova laborformo montriĝis utila kaj efika, sed ni devas ankoraŭ modernigi ĝin konforme al disponeblaj retfaciligoj kaj retkapabloj de la estraranoj. La membroj povis legi en IPR 03/3 pri kelkaj rezultoj de la estrara laboro el tiu periodo, sed la rezultoj venas pli konvinke kun ĉi tiu numero kaj kun la nova rethelmo de ILEI ĉe www.ikso.net/ilei. Varbkampanjo por membrara kresko de la organizo, ekkonstruo de la nova retpaĝaro, daŭre regula eldonado de IPR kaj *Juna amiko*, relanĉo de la projekto *Interkulturo* al eksperimenta uzo en nova eldono, novaj projektideoj, preparoj por la *Konferenco 2004*, agado ĉe *Unesko* kaj iniciatoj en la sfero de instrukapabligo estas kelkaj paŝoj sur la vojo al la proklamita celo de organiza refortiĝo. Necesas rekoni kaj plutiligi ankaŭ aliajn kaj alies projektojn kaj agadojn en la eduka kampo, laboron de ĉiuj

individuaĵoj, grupoj kaj institucioj kiuj konformas al la celoj de ILEI. Tamen, ni estas nur ĉe la komenco por solvi organizajn, financajn kaj agadajn problemojn kiuj akumuligis ĉe ILEI dum jaroj. Pluraj iniciatoj kaj reagoj de sekcioj kaj aktivuloj, ĉu kritikaj ĉu subtenaj, montras ke la Estraro povas kaj devas havi pli firman kaj kontinuan kunlaborkontakton kun la aktivuloj, membraro kaj partneroj de ILEI por iri al tiu solvo kaj plu. Ni flegos tiun laborstilon de reciprokaj kompreno kaj subteno.

Dezirante al ĉiuj legantoj de IPR kaj al ĉiuj membroj kaj amikoj de ILEI plezuraran adiaŭon kun la foriranta jaro kaj ĝojan renkontiĝon kun la nova, ni esperas pli oftajn renkontiĝojn kun vi kaj pli viglan interkomunikadon estonte.

Via Estraro

'Inter vi, mi, kaj niaj kulturoj'

Interkulturo 2 lanĉita

La projekto *Interkulturo* en la dua eldono (IK2) estis lanĉita en eksperimentan uzon meze de oktobro 2003. IPR 03/2 raportis sur la paĝoj 1-4 pri la planoj kaj evoluo de la refunkciiga projekto kun tri prioritataj celoj por la unua jarduono cititaj sur la paĝo 3. Ĉiuj tri prioritatoj realiĝis. La metodika teamo de IK2 ellaboris por la projekto taŭgajn metodojn kaj proponis esplortemojn, ekzercojn, taskojn kaj ludojn por interkultura lernado kaj edukado per Esperanto kaj Interreto. Okazis metodika trejnseminario aŭguste en Svedio, pri kiu iom raportis IPR 03/3. Nova IK-trejnseminario organizata de E@I, partnero de ILEI kaj kunrealiganto de IK2, okazos printempe en Sarajevo.

La repaĝara teamo de E@I konstruis la novan paĝaron *www.interkulturo.net* kiu subtenas la metodikon kaj kiu nun estas libere alirebla. Ĝis la fermo de ĉi tiu numero de IPR registriĝis al IK2 ok grupoj kaj entute 49 individuaj partoprenantoj, ĉu grupanoj (kelkaj aliĝintaj grupoj ankoraŭ ne registris ĉiujn grupanojn), ĉu grupgvidantoj, ĉu IK-helpantoj, kiuj testos la metodikon kaj la paĝaron ĝis la fino de la jaro. La grupoj partneriĝos laŭ similaj esplor-interesoj, elektos metodon kaj esplortemon, faros interŝanĝon, plenumos taskojn kaj elprovos kelkajn ekzercojn, kaj fine

raportos pri la esplorrezultoj. La teamo de IK2 kaj IK-helpantoj sekvos laboron de la partoprenantoj, konsilos, solvados problemojn kaj plibonigados la paĝaron por ke ĝi estu plene preta por pli vasta aplikado en 2004. Ĝia sukceso ekde nun dependas de ĝiaj uzantoj – E-instruantoj kiuj aliĝas al la projekto kun siaj grupoj de lernantoj.

Vizitu la paĝaron nun kaj preparu vin kaj viajn lernantojn por aliĝi al IK2 ekde 2004. Se vi havas ideon kaj eblecon por organizi trejnseminaron aŭ alispecan renkontiĝon de IK-anoj en via mondoparto, skribu al *teamo@interkulturo.net*, aŭ aliĝu al retlisto *interkulturo@yahoogroups.com* kaj diskutu tie. Viaj kritikoj, proponoj kaj konsiloj estas ĉiam bonvenaj.

IK2-teamo

IK-Trejnseminario

impresoj de partoprenantoj

"Interkultura lernado estas procezo de esploro de si mem kaj sia propra kulturo paralele kun konatiĝo kun aliaj kulturoj kaj individuoj. Ĝi gvidas al interkultura kompreniĝo, toleremo kaj do, longperspektive, paco," diras *Sonja Petrović* pri la ĉefa temo de *Projekto Interkulturo* kaj la trejnseminario, kiu okazis ĉi-somere en suda Svedio. La seminario, kiu okazis samtempe kaj samloke kun la ILEI-konferenco, estis por pluraj la tria semajno de E-eventoj, post la UK kaj IJK. Bonŝance ĝi okazis en bela marborda ripozejo, kie oni povis ludi kun junaj denaskuloj sub klara ĉielo.

Projekto Interkulturo subtenas la procezon de interkultura esplorado kaj lernado inter grupoj de E-lernantoj dise de la mondo. Ĝi realiĝas en kunlaboro de ILEI, E@I, kaj *Esperantic Studies Foundation* (ESF).

Dum printempo kreiĝis novaj interret-paĝaro kaj metodiko por la projekto, kaj provfazo de la nova projekto komenciĝas ĉi-aŭtune per partopreno de nur kelkaj grupoj. Tiucele, okazis la seminario dum la somero por homoj kiuj pretas partopreni en la projekto, kiel grupgvidanto kiu gvidos lernantojn aŭ kiel helpanto kiu respondos al la problemoj alfrontataj de la grupoj. La seminario celis konigi la funkciadon de la projekto kaj la ideoj malantaŭ ĝi, kaj kapabligi la

partoprenontojn uzi la novajn metodikon kaj la retpaĝaron, kiu estos la ĉefa kunlaborilo.

Laŭ Sonja, unu el la organizantoj de la projekto kaj la seminario, la seminario plene atingis tiujn atendojn kaj eĉ pli. "La partoprenantoj mem havis tre interesajn ideojn kaj proponojn per kiuj ili plibonigis kaj riĉigis la projektostrukturon." La partoprenantoj eĥis la senton ke la seminario estis tre fruktodona.

"Antaŭ la partopreno en la seminario, mi havis tute alian imagon kio estas interkultura lernado, kaj kiel ĝi funkcias," diris *Neringa Prekeviciute*, el Litovio. "Klarigon post klarigo, mi estis starigita al la ĝusta vojo kaj konatigita kun scienca bazo de la IK-projekto. Fine mi komprenis kiajn rezultojn donos IK-interŝanĝo."

Ĉeestis la seminarion 15 homoj el Britio, Francio, Israelo, Italio, Litovio, Meksiko, Pollando, Rumanio, Rusio, Ukrainio, Usono, kaj Venezuelo, kaj gvidis ĝin trikapa teamo el Rusio, Svedio, kaj Serbio kaj Montenegro. La projekto realiĝis el cerbumado pri du punktoj: (1) ke multaj homoj lernas E-on en kurso kaj ne scias kion fari per ĝi, kaj (2) ke interkulturaj lernado kaj kompreniĝo estas ĝeneralaj bezonoj de ankaŭ ekster-Esperantia socio, kaj ke projekto kiu subtenus ilin havus pli larĝan valoron. *Projekto Interkulturo* esperas respondi al tiuj du. E-lernantoj en la projekto pli frue renkontos la utilecon de E-o per komunikado kun aliaj grupoj farante ĝuigajn taskojn mem elektitajn. Kaj la projekto estas strukturita por speguli la bezonojn de ĝenerala socio kaj la dezirojn de subvenciantaj instancoj.

La partoprenantoj de la seminario mem tra-spertis grup-ekzercojn kreitajn por elmontri konceptojn pri kulturo kaj interkultura rilato. Unu baza koncepto kiun renkontis la seminarianoj estas la ideo, ke kulturo estas kiel glacimonto. Glacimonto en la maro havas pinton kiu videblas super la akvo kaj parton – pli grandan – kiu situas sub la akvonivelo, kaj do ne videblas. Simile, la kulturo de individuo aŭ grupo havas videblajn aspektojn – la vestaĵoj, la lingvo, la kantoj, la agoj, ktp. Tiuj videblaj aspektoj, tamen, estas nur supraĵoj. Kulturo havas ankaŭ pli profundajn aspektojn kiuj ne videblas – ekzemple, la valoroj kaj supozoj de la kulturo kiuj ofte estas la kaŭzoj de kiuj la supraĵaj aspektoj estas nur la rezultoj.

Kiam oni parolas pri interkultura interŝanĝo, tro ofte temas nur pri interŝanĝo de la supraĵaj aspektoj – jen niaj manĝaĵoj, jen niaj vestaĵoj, jen niaj muzikoj. *Projekto Interkulturo* celas helpi lernantojn rekoni ke

ekzistas pli profundaj aspektoj de kulturo kaj doni al lernantoj metodikon por pli profunde esplori kulturojn.

La ekzercoj dum la seminario frape montris diversajn vidpunktojn kaj kulturajn supozojn de la partoprenantoj, kiuj ne montriĝis per la kutimaj interkonatiĝaj ludoj ĉe E-kongresoj. Tiun sperton la grup-gvidantoj esperas havigi al siaj lernantoj. Laŭ *Vicente Valdes Bejarano*, seminariano el Meksiko, gravas diskonigi la Projekton pro tio ke "la nuntempa situacio tutmonde direktas al interkonsento de politikaj planoj, kaj pro tio la gejunuloj devas esti sufiĉe preparitaj por tiu proksima estonteco jam antaŭvidita. Per tiu ĉi projekto ni povos kontakti homojn el diversaj pensmanieroj kaj lerni de ili aliajn gravajn konceptojn pri la mondo mem, la komprenojn pri niaj komunaj situacioj por ke ni difinu pli bone kaj proksime de la realo la okazojn de nia ĉirkaŭaĵo."

Organizantoj kaj prizorgantoj de la *Projekto Interkulturo* esperas ke la aŭtuna provfazo helpos la finpoluradon de rimedoj kiujn la projekto ofertas al siaj uzantoj/partoprenantoj, kaj ekde printempo 2004 la projekto rekvivos kun plena forto. La revoj estas ankaŭ starigi konstantan rubrikon en la revuo de TEJO "*Kontakto*" per kiu ĉiuj interesitoj pri la projekto povos sekvi ĝian evoluon, kaj ankaŭ aliaj povus legi interesajn rezultojn de kunlaboroj kiuj okazos kadre de ĝi. Jam marte 2004 okazos ankaŭ dua, pli granda, trejnseminario por nova aro da partoprenantoj.

Aktualajn kaj pli detalajn informojn eblas trovi ĉe www.interkulturo.net aŭ ricevi per membriĝo al interkulturo@yahoogroups.com. La organiza teamo kontakteblas rekte per teamo@interkulturo.net.

Jacob B Schwartz, <quark@MIT.EDU>

Varbendas, do varbiloj

La nova estraro – kaj ni ĉiuj – frontas grandajn defiojn. La ĉefartikolo de la antaŭa numero kaj la informilo sur la sekvaj paĝoj resumas niajn taskojn. Inter la plej urĝaj bezonoj estas rapide rekreskigi la membraron por 2004, ĉar nur el tiu solida bazo ni sukcesos evolui sur aliaj kampoj. Ni alvokas al vi ĉiuj – sed precipe al niaj sekciestroj, komitatanoj kaj sekciaj aktivuloj – streĉu ĉiujn fortojn atingi bonajn rezultojn. Nun

komenciĝas la varba sezono. La estraro elektis seson da landoj kie celas koncentri siajn energiojn, sed kreskoj ĉie endas. Por varbi, necesas varbiloj. Ni pretigis du, kun malsamaj cel-grupoj:

La varba folieto

Tion vi trovos aldonita al ĉi tiu IPR. Ĝi estas por ĝenerala distribuo, en kaj ekster instruistaj rondoj. Ĝi aperu en E-oficejoj, centroj, aranĝoj kaj disiru kun viaj sekciaj bultenoj aŭ kun aliaj revuoj en via lando. Laŭ viaj mendoj, ni krompresos ĝin.

La laborplano

Tio aperas sur la sekvaj kvar paĝoj.¹ Post varba enkonduko, ĝi prezentas resumon de la laborplanoj de niaj estraranoj, kies plenaj versioj videblas en nia nova hejmpaĝaro. Tiu varbilo estas krompresita kaj je dispono por pli limigita distribuo, ĉefe en edukaj rondoj, aŭ inter homoj kiuj jam simpatias al ILEI aŭ komprenas la gravecon bonigi la instruadon kaj uzon de Esperanto. Ankaŭ por rehavigi al ni eks-membrojn! Alivorte, al tiuj, kiuj pretas – kaj eĉ volas – legi pli detalan tekston kaj kiuj jam estas potencialaj membroj. Al ili eblas doni ankaŭ la krompresitan folion el la mezo de la antaŭa IPR, kiu prezentas la biografiojn kaj fotojn de la estraranoj.

Ni konstatis, ke en la movado jam ekzistas multaj potencialaj membroj – centoj da instruistoj, edukistoj kaj simpatiantoj troviĝas kaj aktivis ekster ILEI. Ilin ni varbu!² Aperos tiucele en nia hejmpaĝo elŝuteblaj versioj de ĉi tiuj kaj aliaj varbiloj, kiel ekzemple prespretaj komunikoj kaj anoncoj proponablaj al aliaj gazetoj.

Se vi varbemas, bv. direkti viajn mendojn por niaj varbiloj al nia sekretario, skizante kiel vi planas uzi ilin. ILEI volonte kunlaboros kun sekcioj por kune okazigi reklam-kampanjojn en viaj landoj.

Stefan MacGill

¹ Sur foto de p. 19.: Para laboro dum kurso de *Sylvain Lelarge* en Kvinpetalo 2003 aprilo.

² Ne forgesu! Ni akceptos membrigojn (kaj abonojn por Juna amiko) por 2004 je la nunaj pli favoraj tarifoj, gis la 31-a de decembro 2003. Indas ne prokrasti.

el la landoj kaj sekcioj...

Brazilo

ILEI-BR aktivegas

ILEI-BR sukcesis ricevi ĝis nun 56 novajn aliĝojn por la jaro 2004. Nuntempe, ĝi finpretigas sian kampanjon por eĉ pligrandigi tiun kvanton (oni celas, kiel anoncite, ekhavi 100 aliĝintojn).

Kadre de la 38^a Brazila Kongreso de Esperanto, kiu okazis la pasintan julion kaj bonvenigis preskaŭ 500 homojn, ILEI-BR havis budon kun konstanta deĵorado, kiu prizorgis aliĝojn kaj klarigis al la interesata ĉeestantaro pri la sinteno de nia Ligo, krom disvastigi la eldonaĵojn (Juna Amiko, IPR, Tendaraj Tagoj...) de ILEI kaj malfermi novajn perspektivojn por efektiva agado.

Oni organizis ankaŭ ILEI-ekzamenojn (kun 35 homoj) kaj dutagajn kunvenojn (kun ĉeesto de 40 homoj) por antaŭprepari la enlandan E-instruistan laboron.

Laŭ informoj de Rodrigo de Méo kaj Cecília Milani

Gesekretarioj ILEI-BR

ileibr@linguauniversal.com.br

Britio

Esperiga revigliĝo

La brita sekcio lastatempe refortiĝis, revigliĝis kaj reaktivis. Dum la somero ni okazigis la jam tradician 'Somerlernejon' sub la gvido de *Paul Gubbins* kaj kun la afabla partopreno de gastpreleganto *Gianfranco Molle*. Por la venonta jaro akceptis nian inviton *Ionel Onet*, do venu pasigi belan semajnon (7a-13a de aŭgusto 2004) en bela regiono kaj profitu de la okazo por viziti la ĉefsidejon de *Esperanto-Asocio de Britio*, kies konstruaĵoj troviĝas samloke.

Ĝus sukcese okazis nia unua porkomencanta semajnfino sub la titolo 'Course-You-Can' ('Kompreneble vi povas' – kaj vortludo 'course' kiu signifas kaj 'kompreneble' kaj 'kurso'). Kiel vi ĉiuj scias britoj ĝenerale ne multe interesiĝas pri lingvoj, do ni aparte ĝojas, ke aliĝis 18 homoj, el kiuj pluraj aĉetis novan kurson ĵus finpretigitan. Tiu ĉi nomiĝas 'Elementary..!' kaj estas bazita sur la libro *Gerda malaperis* de *Claude Piron*. La tri-parta kurso enhavas 25 broŝurajn lecionojn, 2 KD-ojn,

memtestajn demandojn kun solvoj, enigmojn por pligrandigi la vortprovizion, la tuto sub la gvido de kursgvidanto.

Kuŝanta ĉe presejo nun estas nova A/6-formata vortareto (Esperanto-angla, angla-Esperanto) kiu enhavas ĉirkaŭ 2500 kapvortojn kaj resumon de la Esperanta gramatiko. Kompilita de prezidanto de EAB, *Edmund Grimley-Evans*, la vortareto estas tre utila kaj malpeza, malmultkosta unua vortaro por lernejoj kaj komencantoj.

Nia nuna projekto estas reverki kaj represi la tre sukcesan E-an version de la mondfama porinfana libro '*Mil unuaj vortoj*'. EAB nun pretas akcepti antaŭmendojn kaj ni esperas, ke la libroj estos pretaj en la printempo de la venonta jaro.

Laste, ni starigis niajn proprajn priedukajn TTT-paĝojn. Do se vi interesiĝas pri la brita Esperanta eduka mondo bonvolu rigardi: www.esperantoeducation.co.uk. Por plia informo pri la libroj supre menciitaj bonvolu kontakti eab@esperanto-gb.org

Finnlando

Angla kaj finna grupoj renkontiĝos en Strasburgo

La Eŭropa parlamento regule invitas lerneajn grupojn al Strasburgo, kie la junuloj dum la t.n. *Euroscola-tago* spertas la parlamentan laboron. Dum la jaro 2001 speciala E-grupo estis invitata kaj dum la sekva jaro du E-grupoj partoprenis. Poste oni ne plu volis akcepti tiajn diverslandajn grupojn.

Lige al projekto de la E-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI) finna gimnazio jam en decembro 2002 anoncis sin por partopreno en aprilo 2004 kiel tute normala finna grupo. Tiu grupo tamen estas speciala, ĉar en ĝi ĉiuj lernantoj lernis E-on. Estas 21 lernantoj de la sendanta lernejo kaj 10 kiuj lernis E-on dum aliaj kursoj. En septembro 2003 la gimnazio ricevis inviton partopreni al *Euroscola* la 28-an de aprilo 2004.

Samtempe partoprenos ankaŭ angla grupo. Ĉar oni ne oficiale povas paroli E-on en la parlamentejo, gravas ke la lernantoj antaŭ la *Euroscola* havu eblecon sperti veran E-an etoson. Tio okazos per korespondado kiu jam komenciĝis, sed ankaŭ dum la seminario *Eŭropa Amikeco* okazonta en Strasburgo de la 25-a ĝis la 29-a de aprilo. Kunorganizanto de tiu seminario estas slovena grupeto, kiu eble ne partoprenos al *Euroscola*.

Por fari la seminarion vere internacia ni invitas grupetojn, 3-8 personajn anonci sian intereson al la prezidanto de ELFI (*vidu la kovrilpaĝon*). La

programon plejparte preparas la junuloj mem pri „kiel diferencas kaj kiel similas ekz. la junulara kulturo, lerneja sistemo kaj lingva situacio en la diversaj landoj”. Kompreneble estos ankaŭ urborigardo kaj distra programo.

Por la sekvaj jaroj jam nun indas esplori la eblecojn en ĉiu lando de EU sendi grupojn al *Euroscola* kaj kunordigi ilin al samtempa partopreno, ekz. dum lasta semajno de aprilo. ELFI jam trovis kandidatan lernejon por 2005.

Carola Antskog

Francio


Grezijonaj lingvokursoj

Precipe somere *Kultura Esperanto-Domo Gresillon* (grezijo, nazala o) organizas tri-nivelajn E-kursojn ĉiusemajne. En la somero 2003 averaĝe 20-30 homoj partoprenis, sed antaŭ dek-dudek jaroj al *Greziĵono* venis eĉ 70-80 homoj semajne, kaj ĝi povas tranoktigi kaj manĝigi tiom da partoprenantoj. Supozeble la kelko da jaroj, kiam ĝi estis fermata pro riparado kaj konstruteknika modernigado, turnis la atenton de esperantistoj al aliaj Esperanto-ejoj.

Greziĵono estas konata kiel kastelo. Kun siaj pintaj turoj, ruĝa-blankaj muroj kaj belformaj fenestroj ĝi aspektas romantika kaj alloga. Ampleksaj florbedoj ornamas la korton, sur verda herbejo sub grandegaj arboj povas ludi kaj balanci sin infanoj. En la ĉirkaŭa parko, kiu rimarkeble arbariĝis, oni trovas migradpadojn kaj misteran dolmenon. Nokte neniu lumpolucio vualas la steloĉielon, neniam aŭdeblas bruo de trafiko. Je la distanco de 2 kilometroj situas la urbeto *Baugé* (boĝe) kun ĉiulunda bazono, kastelo, muzeo, restoracioj, vendejoj kaj koninda malnova arkitekturo. La kasteloj de la *Loire* (luar) ne estas malproksimaj, se oni havas propran veturilon. En la ĉirkaŭa provinco *Anjou* (anĵu), kun milda klimato kaj kultivado de vitoj kaj fruktoarboj, oni trovas multajn celojn por ekskursoj. Tial *Greziĵono* estas pli ol taŭga feriejo por familioj kaj grupoj. La ĉambroj havas komfortajn litojn, lavabon, bideon, la duŝoj kaj necesejoj estas komunaj sed proksimaj al la ĉambroj. La manĝoj en la du belegaj manĝoĉambroj de la kastelo estas frandindaj. Ankaŭ neesperantistoj trovas la kastelon vizitinda.

Pro la forta tento al feriado grezijonaj lingvokursoj estas flekseblaj kaj liberecaj. Kutimaj instruhoroj en aŭgusto 2003 estis de 9.30 ĝis la 12a

(kun paŭzo) kaj de la 16a aŭ la 17a horo ĝis la 18a aŭ 18.30, komunaj ludoj de 18.30 ĝis 19.30, kiam komenciĝis la vespermanĝo. Je la 21 horo komenciĝis distra programo: filmoj, diapozitivoj, interparolado, prelegetoj. Se ĉeestas iu, kiu scias instrui manlaborojn aŭ ekzemple pentroarton, tio estas aprezata ŝanco. En la kastela salono oni sidas komforte en remburitaj kanfoteloj kaj sofoj sen tabloj, en unu el la pli malgrandaj ĉambroj de la kromkonstruaĵo oni sidas sur malnovaj lignaj seĝetoj. La plej malgranda ĉambro taŭgas por grupeto de 4-8 personoj, la pli grandaj por 10-30 studentoj. En ĉiuj la tabloj estas grupigeblaj, ne individuaj. Uzeblas videoaparato kun televidilo, magnetofono kaj nigra aŭ blanka tabulo, en la kastela salono oni povas ludi ankaŭ KD-jn. Krome uzeblas granda salono Zamenhof por la plej grandaj eventoj. Haveblas projekciilo por diapozitivoj kaj du ekranoj, el kiuj unu estas movebla. Por infangrupoj plenas kesto je pluŝludiloj. Zorgeme farita movebla panelo-ekspozicio pri la fenomeno E-o estas franclingva, sed pro ĝiaj grandaj koloraj bildoj oni povas utiligi ĝin ankaŭ en E-o. La instruistaro ofte estas internacia same kiel la studantaro, tamen la majoritato kaj kultura bazo estas francaj. De 15 jaroj unu el la plej konstantaj instruistoj (*vd foton*) estas polo *Przemek Grzybowski*, pedagogo el Bydgoszcz. De 5 jaroj kunlaboras polino *Ania Rokowska*, studentino pri psikologio, specialisto



pri ludoj kaj gruplaboro. Kiam mi iris al *Grejzono* por tie instrui la 16an de aŭgusto 2003, mi tute ne konis la kastelon kaj ties kutimojn kaj instruilojn. Tial la komenco timigis min. Instruisto pli bone adaptiĝos, se ŝi jam antaŭe scias, kion atendi kaj kion kunporti. En la biblioteko de *Grejzono* prunteblas multaj verkoj, sed pli sekure estas kunpreni proprajn lernomaterialojn kaj uzi la fotokopiilon de la oficejo. Eble la nova lernolibro, kiun vi deziras uzi aŭ almenaŭ rekomendi, ne troveblas en la biblioteko. En la granda vestiblo haveblas multaj E-aj gazetoj, lokaj, landaj, fakaj kaj internaciaj, sed en hazarda elekto.

De 1951 la kastelon posedas neprofitcela asocio. La origina instiganto por la aĉetado estis fervora esperantisto *Henri Micard*, kiu – kune kun la edzino – dediĉis sian vivon al *Grejzono*. Necesas neimagebla kvanto da rimedoj financaj, intelektaj, administraj kaj korpaj por funkciigi la imponan posedaĵon. E-istoj emas krei novajn kulturcentrojn kaj kunvenejojn, sed ni devas kompreni, ke unue ni zorgu, ke la jam ekzistantaj centroj funkcii. Ni ne forgesu *Grejzonon* sed ni utiligu la famon kaj tradicion, kiujn ĝi jam sukcesis krei por si per la sindonemo, senpaga laboro kaj mondonacoj de multaj idealismaj samideanoj.

Adresoj: *Kultura E-Domo, Grésillon, FR-49150 Baugé, Francio*
<http://grejzono.kastelo.free.fr>, grejzono.kastelo@free.fr,
paulettenaulet@minitel.net.

Saliko

Instruo de Esperanto en resaniga medio

En *Universitato Nancio, S-ino Claudie Demongeot* prezentis raporton pri instruo de E-o cele de sia supera diplomiĝo je sociaj studoj.

Ŝi estas faka edukistino instruanta al adoleskantoj suferantaj pri psikaj problemoj. Ŝia profesia klopodo celas unue doni kompletigan kurson al adoleskantoj kiuj malĉeestas lernejon pro psikaj problemoj kaj due helpi al la lernantoj kiuj ne kapablas fari siajn taskojn tute solaj pro la samaj kialoj.

En la Centro kie ŝi oficas, oni akceptas gejunulojn inter 16 kaj 20-jaraj. La malsanoj kuracendaj ampleksas psikopation, neŭrozon, fobion pri lernejo, deprimon, riskivan konduton, anoreksion, personecan perturbon ktp. Ĝis nun ŝi instruis al malsanaj lernantoj matematikon, gramatikon, ktp., sed ŝi dubis pri la efikeco de sia klopodo en tiu kampo, ĉar temis pri kutimaj lernejoj objektoj. Ŝi skribas: "Mi deziris trovi novan instruagadon por ke ili pli eme lernu kaj ankaŭ por ke ili akiru pli pozitivan ideon pri si

mem. Tute hazarde, kaj eble ĉar niaj provoj ĝis nun ne montriĝis fruktodonaj, mi komencis instrui E-on al volontaj adoleskantoj."

De 1998 ĝis 2003, ŝi proponis E-on al volontuloj. Dum tiu kvinjara klopodo ŝi listigis sukcesojn ĉe pluraj adoleskantoj kiuj retrovis emon por lernadi spertante la rezultojn de propra studelekto. Deko da ili tiel akiris denove memkontentiĝon. Estas notinde ke la ebla aliro al la TTT favoris la elekton de la internacia lingvo.

Ŝia raporto instigu edukistojn uzi E-on kiel nekutiman fakon por veki plian emon por lernadi ne nur en saniglernejaj medioj.

Vizitu: <http://claudisite.multimania.com>.

Germanio

"Esperanto en teorio kaj praktiko" en Aŭgsburgo

Dum la somera semestro 2003 en la universitato de Aŭgsburgo (Germanio) okazis baza seminario kun la titolo "*Esperanto in Theorie und Praxis*" [*E-o en teorio kaj praktiko*]. Menciindas, ke ĝi estis iniciato de profesoro *Hans-Jürgen Heringer*, kiu ne estas e-isto sed okupiĝas pri interkultura komunikado ene de la Aŭgsburga katedro "*Germana kiel fremda lingvo*".

Komence interesiĝis ĉirkaŭ dudek personoj pri la temo, sed partoprenis ĝis la fino 16 studentoj el diversaj landoj (Germanio, Brazilo, Ĉeĥio, Hungario, Hindio, Vjetnamio, Koreio, Italio) de la fako "Germana kiel fremda lingvo", do, studentoj, kiuj studis plejparte en sia dua semestro kaj kiuj volas fariĝi lingvoinstruistoj pri la germana.

Interesaj por mi estis la motivoj de la studentoj partopreni tian seminarion. Eta enketo komence de la seminario montris la jenajn dezirojn kaj atendojn (mi ĉi tie pli-malpli proksime vortigas la esprimojn sur la slipetoj): "*Deziro rigardi 'malantaŭ la kurtenon' / Ĉu E-o estas mikso el la hispana, la angla, la franca? / Ĉu ekzistas gramatikaj strukturoj kaj literaturo? / Al kiuj lingvoj parencas E-o? / Ĉu helplingvo? / La komenco de E-o: kie, kiu, kiam, kial? / Kial ĝi ne sukcesis? / Kiel disvastiĝas E-o kaj kiom da homoj parolas ĝin? / Kie E-o estas disvastigita? / Kiel oni povas praktiki la lingvon?*". Kaj antaŭ ĉio estis la deziro "*lerni la lingvon*", kiun preskaŭ ĉiuj donis kiel kialon partopreni.

Sekve unu el la celoj de la seminario estis spertigi al la studentoj la lernadon de tute nova, nekonata lingvo kaj konatigi al ili kiel estontaj

lingvoinstruistoj instrumentadojn kaj rimedojn por igi la lingvolernadon interesa. Tiun celon plenumis la parto "*Esperanto en praktiko*". Kiel instrumaterialojn mi uzis ĉefe proprajn en kombino kun materialoj de la kurso de *Rudolf Fischer* (Germanio). Apude kiel hejmtaskojn la studentoj trairis la kurson de *Ulrich Becker* (Germanio), kiun dumlonge uzis *Germana E-Junularo* kiel korespondan kurson. Ĝi tamen montriĝis iom malfacila, ĉar multaj taskoj baziĝas sur tradukoj, kiuj foje estis malfacilaj por nedenaskaj parolantoj de la germana. Tamen la studentoj ricevis laŭ mia impresado kaj laŭ sia fina juĝo bonan gramatikan bazon, kiu kompletigis la komunikorientiĝon en la seminario mem. Tiuj, kiuj volis, povis kompreneble sekvi aliajn retajn kursojn, por kiuj mi indikis la ligojn, sed laŭ mia scio nur kelkaj faris tion.

En la teoria parto – laŭ la orientiĝo je interkultura komunikado – ni traktis interalie demandojn pri E-a fonetiko kaj ĝiaj normoj, lingvoevoluo, radikoj de E-aj vortoj, influo de naciaj lingvoj, frazeologismoj kaj interkultura komunikado pere de E-o. Aliaj tiaj temoj, kiuj respondis al la scivolemo de la studentoj (vd. supre) estis informoj pri la komencoj de E-o, pri lingvokomunumo, pri literaturo, muziko kaj ebloj praktiki E-on.

Por ricevi atestilon pri sukcesa partopreno 10 studentoj kontribuis mem al la enhavo: kelkaj kuraĝis jam mem instrui E-on al la kunstudantoj, kelkaj elektis prelegeti teorie. La ĉi-lastaj dependis de la havebla aktuala literaturo, kiu ne abundas en lingvo legebla por ili – ĝenerale ne kaj krome ne havebla en la biblioteko. Tamen ni aŭskultis bonajn studentajn prelegetojn pri "*La E-lingvokomunumo*", "*Ebloj praktiki E-on*" kaj "*Influoj el naciaj lingvoj*".

Alia enketeto fine de la kurso montris, ke la atendoj de ĉiuj studentoj estis principe plenumitaj, kelkaj deziris eble aŭdi iom pli pri tia aŭ jena temo, ekzemple muziko. Kelkaj deziris esti povintaj paroli la lingvon iom pli, tio tamen ne eblis ene de la seminaria tempo – sume la tempo disponebla por efektiva ĉeesto (12 semajnoj po 90 minutoj) egalas ja pli-malpli al unu semajnfina kurso. Sed la babilado kun eksterlanda esperantisto, kiun mi invitis fine de la kurso, montris, ke ili sufiĉe impresis progresis dum la tuta semestro.

Laŭ mia ekscio el la enketilo la plej multaj volas plulerni (kaj sentas sin informita pri ebloj fari tion), kvankam ili ne certas, ĉu ili vere iam

praktike uzos la lingvon. Se ili indikis intencojn de estonta uzo, tiuj estis "korespondi", "aŭskulti E-muzikon", "legi E-literaturon", "vojaĝi" (aliaj elektebloj estis: partopreno en interretaj diskutgrupoj, vizito de loka E-grupo, partopreno en internacia E-renkontiĝo).

Mi ne scias, ĉu eble kelkaj el la studentoj iam iĝos aktivaj e-istoj. Mia celo estis serioze informi tiujn, kiuj volis ekscii pri la lingvo. La koncepto (lingvokurso en kombino kun teoriaj foninformoj je universitata nivelo, kaj krome kun kontribuado de la studentoj mem) bone funkciis, kaj la partoprenantoj esprimis sian kontentecon pri la seminario – pri la etoso, pri la enhavo, pri la instrumentado. Ankaŭ por mi estis bonega defia seminario kaj mi ĝojas, ke en la venonta vintra semestro mi povos oferti ĝin denove. Mi esperas, ke estos denove scivolemaj partoprenantoj.

Birke Dockhorn



Japanio

Fakkunsido de ALE (Asocio de Lernejoj Esperantistoj)

Dum la 90-a Japania Kongreso (11-13.10.2003) ALE havis fakkunsidon "Verdajn ventojn en lernejojn" kiun ĉeestis dekelkaj homoj. Inter 60-70 membroj instruistaj kaj eksinstruistaj ankaŭ troviĝas kelkaj, kiuj ne estas instruistoj sed jam blovigis verdajn ventojn en lernejojn. En la kunsido raportis kelkaj pri siaj spertoj kaj planoj instrui E-on en lernejoj inkluzive de iu kolegio pri agrikulturo en la gubernio Isikawa.

Ĉi-jare en kelkaj supermezlernejoj (por 15-18-jaruloj) E-o estas oficiale traktata. En la supermezlernejo Nippa en Jokohamo, E-o estas unu el fakultativaj lernobjektoj dumjaraj kun 2 poentoj. 26 lernantoj ĝoje lernas la lingvon sub la gvido de s-ro Kitagawa Hisasi. La klaso komenciĝis en 1998 kun la iniciato de s-ino Kitagawa Ikuko, ĉefo de ALE, kaj la unuajn kvar jarojn ŝi mem instruis. ALE estis fondita en 1997 por kuraĝigi instruistojn iamaniere enkonduki E-on en lernejojn kaj la sukceso de Nippa alportis al ni esperon. Ne kiel dumjara lernado sed kiel parto de "integrita aŭ temo-bazita" lernado, en kelkaj supermezlernejoj kaj ankaŭ en mezlernejoj (por 12-15-jaruloj) E-o estas instruata ĉi-jare.


ISIKAWA Tieko,

<isksanjo@ff.e-mansion.com>

Svedio

Ni kondolencas.....

NdIR: Post la redaktifino venis la trista informo, ke la 9-an de novembro 2003 post mallonga malsano forpasis nia estrarano, s-ino Boo Mee Kim-Lindblom. Funebras la edzo Roland Lindblom, la filino Gianne Rheis kun familio, la sveda E-movado kaj ILEI. Ni adiaŭos ŝin en IPR 2004/1.



[surfote: Boo Mee instruas paperfaldadon en la 34a Konferenco de ILEI]

Olle Olsson 1909 - 2003

Olle Olsson, Lund, Svedio, honora membro de ILEI mortis la 13-an de oktobro 2003.

Kiel juna studento li lernis E-on dum la 20-aj jaroj, kaj poste li dum sia tuta vivo entuziasme laboris por disvastigi la konon de la Internacia Lingvo. Kiel instruisto, ĉefe en Lund, li gvidis multegajn E-kursojn por infanoj. Li plurfoje kun siaj klasoj partoprenis en la tiama projekto

"*Grajnoj en vento*". Li ankaŭ senlace laboris por la kono pri kaj la kompreno por UN.

Jam de la fondiĝo de la nova ILEI 1949 li membriĝis. Do, li fakte estis unu el niaj pioniroj. Li eniris la estraron de ILEI en 1965, unue kiel dua sekretario kaj ekde 1974 kiel kasisto. Tiun postenon li prizorgis ĝis 1982.

Li dum multaj jaroj estis estro de la Sveda sekcio de ILEI. *Olle Olsson* estis ege vojaĝema kaj li preskaŭ ĉiujare partoprenis en la UK-oj kaj en la ILEI-konferencoj aŭ en aliaj E-aranĝoj. Li havis bonajn kontaktojn kun gvidaj esperantistoj. Tiel li sukcesis en kunlaboro kun aŭstria donacinto krei la "*Fondaĵon Erika Linz*", kiu helpas gejunulojn partopreni en internaciaj E-aranĝoj.

La funebra ceremonio okazis en Lund la 24-an de oktobro, la tagon de UN. La subskribinto reprezentis kaj metis florkronon en la nomo de ILEI.

Bertil Andreasson

Por via notlibro

Ĉu vi ŝatus prelegi dum la 37-a ILEI-Konferenco?

En la urbo Jingzhou (Ĉinio) okazos la 37-a ILEI-Konferenco. Ĝia temo estos 'Kultura kaj lingva diverseco'. Ni invitas la interesitojn prelegi kadre de ĝi rilate al la konferenca temo. La interesitoj povas prezenti sian prelegproponon retpoŝte aŭ papere al la Estrarano pri Konferencoj (adreson vidu en la kovrilpaĝo). La propono enhavu koncizan resumon de la prelego (ĉirkaŭ 150 vortoj maksimume) en Esperanto, koncizan bibliografion kaj personan biografion. Bv aldoni ankaŭ malgrandan foton por publikigo. Aparte bonvenaj estas aziaj kandidatoj. La sinproponoj estos pristuditaj de la Komisiono nun kreiganta tiucele.

Limdato por la kandidatiĝo: *la 31-a de marto 2004*.

Interlingvistikaj kursoj kaj seminarioj serĉataj

"*Germain Pirlot* rekompiladas informojn pri E-kursoj kaj seminarioj pri interlingvistiko, kiuj estas OFICIALE organizataj en universitatoj kaj samnivelaj altlernejoj.

Ĉiuj informoj bonvenas ĉu rete <gepir.apro@pandora.be>, ĉu poŝte "*Steenbakkersstraat 21, BE-8400 Oostende, Belgio*".

Kiu korespondas pri medaloj sur oficiroj?

Invito al Esperanto, E.S. Perevertajlo, Impeto, Moskvo-Taŝkento, 1999. Abunde kaj nigra-blanke ilustrita de Rafael Matevosjan. 48p, 21 x 29,7 cm, ISBN 5-7161-0058-9.

Ses nacie vestitaj infanoj tenas supre liter-ŝildojn kiuj proklamas ESPERANTO-n. Jen la kovrila ilustraĵo por grand-formata lernilo por komencantoj (7-9-jaraj) el Taŝkento. Jen konciza resumo de la lecionoj:

1. Dudek substantivoj prezentitaj bilde. Neniu fraz-formado.
2. Netransitivaj verboj: *stari, sidi, kuŝi, iri, kuri, pendii, fali, boji, kribi, veturi, flugi...*
- 3-4. La plena alfabeto, *kaj, -in-, pluralo, -oj, prepozicioj, negado.*
5. Verboj: *paroli, doni, kanti, preni...* uzitaj netransitive. Pronomoj, *kiu, kiuj, la.*
6. Transitivaj verboj: *doni, preni, kanti, manĝi, trinki, legi, vidi, kapti, sendi, ĵeti, beki ion.*
- 7-8. Numeroj per domenoj, adjektivoj, *kia, -an, -on, -ajn, -ojn.*
9. posedaj pronomoj, *esti - troviĝi.* Klarigas la infinitivon, sed ne uzas ĝin. *Kie.*
- 10-12. Profesioj: *bakas, kuracas, kuras, konstruas ktp, -ej-, korpopartoj, de.*

Aperas klarigoj ruse, kun Esperanta traduko aŭ resumo. La libro prezentas malmultan gramatikon eksplicite, kaj ĉefe por instruistoj. Jen la traduko de la konsilo pri klasika stumbligilo por slavlingvanoj: "*La artikolo 'la' ne tradukiĝas. Oni ĝin metas antaŭ tiu vorto antaŭ kiu oni povus diri 'tiu' aŭ 'ĉi tiu'.*" Dialogoj aperas malmulte, nur en lecionoj 9 kaj 10. Sed estas multaj taskoj. Verboj frue kaj multe aperas, sed malmultaj transitivaj. Por lernanta aktivigo kaj la fruktodona lernado kiu sekvas el tio, manko estas neenkonduko de imperativo. Maltrafita estas la ebleco komprenigi kaj verbojn kaj substantivojn: "*Donu la libron! Dankon!*" ktp. Fine, la libro proklamas la celon prepari infanojn por korespondado, kaj tio ja ne postulas multan parologon kaj dialogadon, sed tiam ja indus modelaj poŝtkartaj kaj leteraj tekstoj. La donitaj ekzemplaj frazoj servas gramatikajn bezonojn pli ol komunikajn. Por korespondado malmulte utilas '*Kukumo kuŝas sur skatolo*', '*Papero kuŝas sub tomato*', '*Medalo pendas sur oficiro*' ktp. Sed kiu sopiras tradician lernilon, kaj ne timas cirilajn spicaĵojn, jen ĝi. Por ruslingvanoj, klare la utilo estas plia.

Stefan MacGill



Sylvain Lelarge dum sia kurso en Kvinpetalo en 2003 aprilo

ILEI-Konferenco 2004

Konferenca urbo: *Jingzhou*, en provinco *Hubei*. Ĝi troviĝas 250 km-ojn for de *Wuhan*. La loĝantaro nombras proksimume 1.600.000 da homoj. *Jingzhou* estas unu el plej antikvaj urboj de Ĉinio kun historio de pli ol 3000 jaroj. Ĝi troviĝas ĉe la *Jangzi-rivero*. Antaŭ pli ol 2000 jaroj ĝi jam estis la centro de la Ĉu-kulturo. En *Jingzhou* abundas multaj arĥeologiaj restaĵoj.

De la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento tie ekaktivis la E-movado kaj la loka asocio sukcese eldonis la E-gazeton nomata "*Esperanta Literaturo*". Nuntempe okazas E-kursoj en la *Jianlgling Fremdlingva Lernejo* (en tiu institucio la kursoj okazas en la elementa kaj la meza lernejoj) kaj ankaŭ en la universitatoj *Jangzi-rivera* kaj *Shashi*. Multaj eminentuloj el tieaj universitatoj delonge donis al la esperantistoj grandan subtenon.

Alveno al Jingzhou: Atingi *Jingzhou* eblas irante unue aviadile aŭ trajne ĝis la urbo *Wuhan*. Tie atendos buso, kiu veturigos la konferencantojn de *Wuhan* al *Jingzhou*.

Flugoj de *Pekino* daŭras pli ol unu horon kaj la kosto estas ĉ. USD 120,00. Bv. atenti, ke la ILEI-Konferenco ne komenciĝas en la sama tago, kiam UK finiĝas, sed sekvaltage. Se vi flugos, bv. mem aranĝi vian tranokton por la 31-a de julio, eventuale mendante kroman nokton en *Pekino* kaj ankaŭ mem organizi vian flughileton.

Trajne de *Pekino* oni vojaĝas 12 horojn kaj la bileto kostas proksimume USD 35,00. Ni konsilas veturi per la vespera trajno eliranta de *Pekino* al *Wuhan* je la 17:00 horo. Per tiu trajno ĉinaj e-istoj iros al la ILEI-Konferenco.

Bonveniga servo: ĝi funkcios ĉe la flughaveno kaj ĉe la trajna stacio.

Vetero: Dum la periodo de la Konferenco la vetero estos varma. La averaĝa aŭgusta temperaturo estas 31°C.

Kurento: La elektra tensio estas 220-volta. La kontaktingoj estas dupolusaj kaj taŭgaj kaj por platformaj kaj por rondformaj kontaktiloj.

Konferencejo kaj hotelo: Ni konferencos kaj loĝos ĉe *Hotelo Shashi*. Ĝia adreso estas 390 *Beijing xilu, Shashi qu, Jingzhou city, Provinco Hubei*. Tel. +86 7168215811. Bv. neniam skribi al la Konferencejo, sed nur al la Estrarano pri Konferencoj!

Estas je nia dispono ĉambroj 1- kaj 2-litaj. Ĉiu ĉambro havas privatan necesejon kaj duŝejon. Oni povas facile atingi ĉiun etaĝon per lifto. Unulita ĉambro kostas EUR 27,00 por 1 persono por 1 nokto kaj 2-lita EUR 22,00 por 1 persono por 1 nokto.

Manĝoj: La kostoj de la manĝoj estas EUR 6,00 tage. Eblas ricevi vegetarajn manĝojn por tiuj, kiuj indikas tiun preferon.

Ekskurso: alloga tuttaga ekskurso kondukos nin al baraĵo de la *Tri Gorĝoj* kaj la *Jangzi-rivero* (EUR 25,00).

Aldonaj kostoj: la kostoj de la busa transporto *Wuhan - Jingzhou* (EUR 9,00) ne estas inkluzivita en la konferenca kotizo.

Kondiĉoj de la konferenca aliĝo

DIFINOJ

Membro de ILEI: tiu kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco.

Junulo: tiu, kiu naskiĝis post 1-a de januaro 1973 inkluzive.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Konferencon pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Konferenco ne okazas aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn kaj eventuale aparte pagendajn aferojn.

La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Konferencaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago ĉe la ILEI-Kasisto. Aliĝilo sen kompleta pago ne estas traktata.

Konferenca Regularo (ekstrakto):

6. *Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco.*

7. *Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro."*

Aliĝilo por la 37-a ILEI-Konferenco 01-06 aŭgusto 2004 – Shashi (Ĉinio)

“Kultura kaj lingva diverseco en edukado”

Konferenca Numero: _____

Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon, fotokopion aŭ samformatan paperon.
Bv tajpi aŭ skribi preslitere.

FAMILIA NOMO VIRO/VIRINO
(por alfabeto ordigo) (forstreku unu)

PERSONA(J) NOMO(J)

ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtokodo)

LANDO TEL N^o (kun prefikso)

FAKSO.....RETADRESO

PROFESIO/FAKO

Mi aliĝas al la Konferenco laŭ la kondiĉoj presitaj sur p. 32-36. de IPR 2003/4 kaj pagas

al la ILEI-Kasisto

al la UEA-konto ilek-a

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn de ĉi tiu aliĝilo.

DATO SUBSKRIBO

ALIĜKOTIZO (vidu dorso)

..... tranoktoj en ...-lita ĉambro*

Manĝoj**

Ekskurso

KASO "Dazzini"

Koleghelpa KASO

KASO "Erika Lins"

KASO "Interkulturo"

Eldona KASO

DONACO

BANKKOSTOJ

ENTUTE (en eŭroj)

* Mi mendas tranokton ekde la ĝis la

en-lita ĉambro

* Se vi mendas dulitan ĉambron, bv indiki, kun kiu vi dividas la ĉambron

** Mi estas vegetarano: jes (), ne ()

Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu ILEI jam havas atestilon?

jes/mi kunsendas (forstreku unu)

Rilate al la konferenca temo mi proponas prelegon kun titolo:

(la resumo devas atingi la adreson de la Estrarano pri Konferencoj ĝis la 31-a de marto '04)

Mi proponas la jenan kontribuon al la distra programo:

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ jena grupiĝo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latinameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la ILEI-Kasisto laŭ jenaj vojoj:

a) al ILEI-konto ĉe UEA: ilek-a, indikante: "ILEI-Konferenco";

b) al poŝtĝirkonto N° 682117-7, ILEI c/o Boomee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio. SWIFT-kodo:

PGSISESS. Uzu IBAN-numeron, kiu rapide kaj korekte helpas la pagon: IBAN: SE 2595 000099 604206 821177. Bv aldoni 8,00 por bankaj kostoj;

c) per via banka konto al la antaŭa adreso. Bv aldoni 8,00 por bankaj kostoj.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON, BV ATENTE LEGI LA SEKVAJN KLARIGOJN:

Kotizoj en EUR validaj: ĝis 31.03.04 ĝis 30.06.04 ekde 01.07.04

	1-a periodo	2-a periodo	3-a periodo
<i>Aliĝkategorio</i>	A/B	A/B	A/B
1. Membro de ILEI	30/20	35/25	45/30
2. Ne ILEI-ano	40/25	45/30	55/40
3. Junulo, handikapulo	20/15	30/20	35/25

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prez.), Katalin Kováts (vicprez.), Bill Maxey (sekr.), Boo Mee Kim-Lindblom (kasisto), Probal Dasgupta, Gbeglo Koffi, Mireille Grosjean,

Elekta: Maritza Gutierrez (kunvokanto), Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute

Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jansson, anstataŭanto: Lars Forsman

Lerneja: Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

Regulara: Rob Moerbeek. **Terminara:** Maŭro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, www.ikso.net), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, www.tejo.org, poŝtadreso ĉe UEA)

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*):

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop** ✉: esperanto@Education.monash.edu.au

IEI: *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

UEA: *Universala Esperanto-Asocio*, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org. A-komitatano el ILEI: **Maŭro La Torre**. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Gbeglo Koffi**.

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Cívade Verde, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, ✉: mireille.grosjean@rpn.ch

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064. La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: *Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge, tel. (+46 8) 777 4175, ✉: boomee.kimlindblom@swipnet.se. Postĝirkonto: 682117-7, Stokholmo. S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS. Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 18 EUR, B-landoj: 9 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*) kaj pike-b (*Projekto Interkulturo*). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas en Jarlibro. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Abonoj *Juna amiko* 2004: Tarifo 1: 12 EUR, Tarifo 2: 7 EUR. Aera sendo: +30%. Signifaj rabatoj por kvantoj (ekde 2 ekz.) Perantoj en trideko da landoj. Vizitu: www.junaamiko.inf.hu. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton. Hejmpaĝo de ILEI ĉe: <http://www.ikso.net/ilei/>*

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeulenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00.
Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: www.tarczy.rlan.hu/tp/r/; jozefo@tarczy.rlan.hu, tel/fakso: +36-89/ 356-050.
Vicredaktorino: katalin@ikso.net. La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leghandi-kapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk.
La nunan numeron ni sendis al la presejo la 10-an de novembro 2003,
redaktofino por la sekva numero: la 15-a de januaro 2004.

SEKCIESTROJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana

☐: selimib@albmail.com

Argentino: Teresita Alaniz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral
☐: alaniztomaz@arnet.com.ar

Aŭstralio: Penny Vos, 511 Wyndham Lane/Kanoona, Candelero NSW AU-2550

☐: penivos@yahoo.com

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

☐: raymond.wylleman@pi.be

Brazilo: Marcos Zlón Zlotovich, C.P.2641, BR 01060-970 São Paulo-SP
☐: ileibr@linguainiversal.com.br

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk
☐: angela@tellier.co.uk

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938

☐: melicharkova@quick.cz

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
☐: zhan@uea.org

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito

☐: cantskog@kolumbus.fi

Francio: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu,
☐: joseph.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász
☐: jozsefo@tarczy.rlan.hu

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran
☐: ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma

☐: pianetaurano@libero.it

Japanio: Isikawa Tiekō 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006

☐: isksanjo@ff.e-mansion.com

Katalunio: Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus
☐: ileicat@hotmail.com

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon 402-751, Koreio
☐: scho@inha.ac.kr

Kroatio/KEL: Ankica Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb,
☐: ankica.jagnjic@zg.tel.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb

Kubo: Pedro Fernández Rodríguez, Requena No. 17 apto. 1 entre S.Allende y Lugareño, Plaza, CU-10600 Ciudad de la Habana
☐: kubesp@enet.cu

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,
☐: iei001@tiscali.nl

Norvegio: Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33 NO-1396 Billingstad
☐: bthuv@c2i.net

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48 12) 638 14 49

Rumanio: Mihai Trifoi, Bl. 1/ap.3, Jud. Covasna, RO-527118 Bixad
☐: trifoi@honoris.ro

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
☐: mirina@online.ru

Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby ☐: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets
☐: mireille.grosjean@rpn.ch

Togolando: Attigbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO,
☐: esp.togo@cafe.tg

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026

Usono kaj Kanado: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US) ☐: dorothyh@west.net

Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas
☐: andesp@internet.ve

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan
☐: LIDELB@freenet.am

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000 ☐: hecg@uea.org

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, ☐: loftur@skyrir.is

Israelo: Gian Piero Savio, P.O.K.386, IL-84965 Omer
☐: gpsa@uea.org

Kongo DR: Ngangu Nduantoni Bakidila, B.P. 13, CD-Lukala, Bas-Zaïre
Kostariko: Hugo Mora Polt-ronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José ☐: miaumiau1@racsa.co.cr

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
☐: piliponis@centras.lt

Meksiko José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo.
☐: jdjcorrales@yahoo.com.mx

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1
☐: gwenda.s@ihug.co.nz

Portugallio: João Jose Santos Rua Damasceno Monteiro, 21-B r/c dto.PT-1170-109 Lisboa
☐: j.j.santos@netcabo.pt

Serbio kaj Montenegro: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, 32000 Čačak ☐: radp@ptt.yu

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana. ☐: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si
Uzbekistano: Eugeno S. Pervertajlo, Abon. jashik 140, Počtam, UZ-700000 Taškento, CIS
☐: eugeny@gimli.com

- ◆ Diskonformigi informojn pri universitata instruado de Esperantologio kaj Interlingviko, kaj krome pri peresperanta lekcio.
- ◆ Kunlabori kun aliaj organizoj (AIS, Fakaj Asocioj, CED, ESF, IEM, CDELE, ...) en didaktikaj kaj esploraj projektoj
- ◆ Evoluigi la latumbazon pri la roloj de la Internacia Lingvo en la instruadaj medioj (konferencoj, seminarioj, kursoj, periodaĵoj, ktp.).
- ◆ Superigi telebibliotekon pri pedagogia eksperimentado rilate Esperanton kaj pri E-lingvaj eseoj en la instrusciencaj terenoj.
- ◆ Funkciigi laborgrupon pri terminologio en la instruaj kampoj.

Eksteraj rilatoj

- ◆ Plifortigi kunlaboron kun alaj institucioj de la E-komunumo
- ◆ Plifortigi novajn elementojn en la ILEI-programojn dum UK
- ◆ Enkonduki ILEI-programerojn al IJK kaj regionaj E-kongresoj
- ◆ Propagandi la utiligon la rilatojn kun Unesko, FIPLV kaj similaj organizoj.
- ◆ Daŭrigi kunlaboron kun neesperantistaj institucioj kaj fondaĵoj en la edukaj kampoj

Vizitu la sekciajn hejmpaĝojn kaj kontaktu niajn sekciojn por pli da informoj:

ILEI: www.ikso.net/ilei/

IPR: www.prczy.rlan.hu/ipr/

Juna amiko: www.junaamiko.inf.hu

Sekciaj informoj:

Sekciaj

Via vojo per la respondilo sur aparta varbilo!

Anonci la niajn internaciecon kaj servojn.
 Vi bezonas la viajn ideojn, sperton, energion kaj kunlaboron.
 Ni bezonas la viajn ideojn, sperton, energion kaj kunlaboron.
 Kune konstrui la instruadon.
 de Esperanto instruado
 kaj la instruadon.
 por edukado.

ilei

Ni bezonas unu la alian

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas la ĉefa renkonto-punkto por instruistoj kaj edukistoj. Ĝi havas operaciajn rilatojn kun *Unesko* kaj estas unu el nur ses aliĝintaj fakaj asocioj de *Universala Esperanto-Asocio*. ILEI havas sekciojn en pli ol 30 landoj kaj membrojn en pli ol 45.

Kiuj bonvenas kaj bezonatas en ILEI?

- ◆ Praktikantaj instruistoj nuntempe instruantaj Esperanton.
- ◆ Instruistoj de lingvoj aŭ aliaj fakoj kiuj volas interŝanĝi spertojn kun alilingvaj kolegoj en Esperanto.
- ◆ Junuloj aŭ aliaj volantaj (aŭ devigataj) gvidi kursojn en aranĝoj, kluboj aŭ per la reto.
- ◆ Personoj kun sperto en trejnado de instruistoj, flego de ekzamen-sistemoj, reta kaj distanca lernado kaj similaj kampoj.
- ◆ Instruistoj kaj -antoj eĉ se nuntempe ne aktive instruantaj la lingvon.
- ◆ Subtenantoj de la instruado de Esperanto kaj interkultura edukado.

Kio ĉe ILEI povas bonveni/konveni al vi?

- ◆ Ilustrita revuo *Internacia Pedagogia Revuo (IPR)* aperanta kun 40-paĝoj kvarfoje jare, prezentante nivelajn fakajn artikolojn kaj ligajn novaĵojn. Ĝia livero estas inkluzivita en la membreco.
- ◆ Ĉiujara internacia konferenco kun fakaj prelegoj en kolegeca etoso.
- ◆ Abonebla revuo *Juna amiko* (4-foje jare, 28-paĝa) kun allogaj legaĵoj en simpla lingvaĵo por lernejoj kaj komencantoj.
- ◆ Aliro al hejmpaĝoj de ILEI, IPR, Interkulturo kaj multaj aliaj.
- ◆ Partopreno en la aranĝoj kaj servoj de niaj landaj sekcioj.

La ligo havas estraron, komitaton kaj laborplanon. Sur la sekvaj paĝoj ni skizas niajn prioritatojn sur ĉefaj laborkampoj. Via membreco helpas al ni realigi ĉi tiujn planojn. Via aktiva kunlaboro en sekcio aŭ por la internacia ILEI estas bona kaj bezonata.

Interna fortigo

- ◆ Firmigi kontaktojn kun sekcioj, fondante novajn kie eble.
- ◆ Kontakti pli regule komitatanojn kaj plekti ilin en projektojn.
- ◆ Sekurigi la financon bazon de la Ligo, i.a. per ne-kotizaj enspezoj kaj pli proksima kost-kontrolo de niaj kontinuaj agadoj.

Konferencoj

- ◆ Pliriĉigi la ILEI-konferencojn per pli granda program-vario.
- ◆ Fortigi la fakan programon kun aktiva partopreno de konferencanoj.
- ◆ Malfermi la konferencojn al neesperantistaj eduk-fakuloj.
- ◆ Altiri konferencanojn de diversaj aĝoj kaj mondpartoj.

Retprojektoj

- ◆ Starigi novan paĝaron por ILEI (www.ikso.net/ilei)
- ◆ Krei retbultenon por komencantoj (www.lernu.net/ja)
- ◆ Daŭrigi laboron pri la mult-lingva kursejo "lernu!" (www.lernu.net)
- ◆ Aldoni la Ligon al la evoluigata "Reta Oficejo" (www.ikso.net/ro)
- ◆ Kunlabori kun la projekto Edukado.net (www.edukado.net)
- ◆ Plibonigi la paĝaron de Interkulturo (www.interkulturo.net)
- ◆ Starigi interaktivan ejon (vikion) por ILEI (www.ikso.net/ilei/vikio)

Interkulturo kaj aliaj projektoj

- ◆ Disvastigi la uzadon de la reta projekto Interkulturo
- ◆ Evoluigi manierojn taksu la efikojn de la projekto
- ◆ Subteni kaj utiligi aliajn edukajn E-projektojn
- ◆ Evoluigi novajn edukajn kaj eduksciencajn E-projektojn

Junulara agado

- ◆ Verki manlibron por junaj instruemuloj.
- ◆ Organizi instrutrejnadon dum TEJO-aranĝoj.
- ◆ Evoluigi ekzamensistemon pli konvena por uzo en junularaj rondoj.
- ◆ Teni proksiman kontakton kun TEJO.

Eldonado

- ◆ Daŭrigi la kreskantan kvaliton – enhavan, aspektan – de IPR.
- ◆ Sekurigi la financon bazon por nia lernejana revuo *Juna amiko*.
- ◆ Diskutigi strategion por ĝia hibrida eldonado – papera kaj reta.
- ◆ Reverki kaj reeltoni kajeron 1 de la lernila serio *Tendaraj tagoj*.
- ◆ Sekvi aliajn eldonajn eblojn kaj bezonojn, inkluzive de reta eldonado.



Para laboro dum kurso de Sylvain Lelarge en Kvinpetalo 2003 aprilo.

Informado

- ◆ Malfermi vojojn pli aŭtomate ret-sendi ILEI informojn al gazetoj, E-centroj, Landaj kaj Fakaj Asocioj, retaj diskut-rondoj ktp.

Lerneja agado

- ◆ Subteni interesajn iniciatojn en la instrua kampo – speciale pri lerneja agado, instrukapbligo kaj ekzamenoj.
- ◆ Observi kaj kompili informojn pri la stato kaj kondiĉoj de E-instruado.
- ◆ Kunorganizi kun TEJO E-kurson en 2004 dum OkSEJT (aranĝo antaŭ la IJK) laŭeble kun seminario pri instrukapbligo.
- ◆ Kunlabori en la projekto "flugiloj" por krei pli facilan sistemon de instrukapbligo, kaj por kunverko de metodikaj libroj.

Scienca kaj Universitata Agado

- ◆ Aktualigi kaj disponigi informojn pri scienca esplorado pri Esperanto-lern-rilataj temoj (lingva lernfaciligo, interkultura edukado, ...) kaj aparte pri uzo de Esperanto en la instrusciencia esplorado.